

Esperanto en humor (p. 4)

Duobla jubileo en Antverpeno (p. 12)

Perfektigaj kursoj kaj ekzamenoj (p. 15)

Tweemaandelijks tijdschrift over alternatieve communicatie en Esperanto

HORIZON.TAAL

36ste jaargang 2005/2 (212)
maart - april

HORIZONTAAL

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w., 33ste jaargang.

Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd.

Redactie en administratie:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen
tel.: 03 234 34 00
fax: 03 233 54 33
E-post: horizon.taal@skynet.be
Webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl.

Abonnementen: 20,00 EUR

Rekeningen:

t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen: KBC 402-5510531-55
of Fortis 001-2376527-06;

Redactie:

Lode Van de Velde

Medewerkers:

Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Jean Pierre VandenDaele, Emiel Van Damme, Agnes Geelen, Ivo Durwael, e.a.

Verantwoordelijke uitgever:

Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

REDACTIONEEL

Diegenen die zich het zinnetje "Esperanto very plezanto" nog herinneren, moeten zeker het artikel *Esperanto en Humor* lezen, waarin o.a. ook de Vlaming F.V. *Dorno* besproken wordt.

Een meer ernstige overdenking: sinds de Vlaamse Esperantobond niet langer erkend is, en bijgevolg niet langer gesubsidieerd wordt door Volksontwikkeling, hangen we nog meer af van schenkingen en erfenissen. Uiteraard zijn dit heel onregelmatige en onbetrouwbare bronnen van inkomsten. Daarom zou het aangewezen zijn toch nog minstens een 500-tal Monato-abonnees bij te kunnen werven, opdat de VEB financiële zekerheid zou hebben. Een praktisch voorbeeldje: moest één op twee van de huidige abonnees één abonnement aanbrengen, waren we zover. Een andere mogelijkheid is uiteraard als individu - of als club - een abonnee schenken aan een minder kapitaalkrachtig individu of club. Andere nuttige wenken kan je vinden in de vorige nummers van Horizontaal.

Tenslotte wil ik nog vermelden dat de vervolmakingcursussen Esperanto zeker doorgaan, gezien de grote interesse. Het programma en meer informatie vind je op pagina 15.

Ĝis tiam!

Lode Van de Velde

INHOUD

Die mensen die geen Esperanto kennen, en die enkel vernomen hebben dat het om een kunsttaal gaat, vormen zich een beeld van de taal, dat zowat overeenkomt met dat van een computertaal: ongeschikt voor het uitdrukken van gevoelens en niets méér bevattende dan enkel koele uitdrukkingen.

De beste manier om aan te tonen dat dit een foutieve indruk is, dat het wel degelijk om een volwaardig communicatiemiddel gaat, is het bestaan van de mogelijkheden van de humor, de moppen (zowel de deftige als de ondeugende en de meer gewaagde moppen) en de woordspelingen in het Esperanto. De meerderheid van nationale en internationale tijdschriften die in het Esperanto verschijnen (gaande van Rusland via China tot Australië) hebben wel een plaatsje voor humor, zowel humor die eigen is aan de Esperanto-beweging, als humor vertaald uit andere talen.

Het is interessant in welke mate de meerderheid van moppen die in elk land verteld worden, perfect internationaal zijn, en dat ze enkel de plaats en de naam van de protagonist aanpassen, zoals ook van bij landgrenzen gebeurt: bijvoorbeeld veel van de Hollandermoppen worden in Nederland verteld met Vlamingen in de hoofdrol en andersom. In het Esperanto zijn dan vaak de sprekers van het Volapük geviseerd.

Er bestaan ook tijdschriften in het Esperanto die uitsluitend aan humor gewijd zijn. Eén van de meest gevestigde is *La kancerkliniko*, met een alternatief karakter, en met soms een nogal zwarte humor. De naam zelf kan al een idee geven: het is om te beginnen een woordspeling, waarvan de letterlijke vertaling "de kankerkliniek" is, maar zijn afkorting 'LKK' is dezelfde als diegene die de organisatoren van congressen gebruiken: (Loka Kongresa Komitato, plaatselijk congrescomité). Van één van de medewerkers, de Catalaan Arnau Torras, kun je hier een voorbeeldje zien:





Via het Internet heb je toegang tot een nieuwer tijdschrift, van gelijkaardige aard: *Vola pug'*, opnieuw een woordspeling tussen zijn directe betekenis: "gewillig gat" (of zoiets van dien aard) en de naam van een kunsttaal die voorafging aan het Esperanto, het Volapük.

Woordspelingen zijn iets alledaags in het Esperanto, niet alleen omdat de Esperanto-sprekers dol zijn op het spelen met taal, maar zeker omdat de taal zelf het zo makkelijk maakt, dankzij haar structuur. De grote makkelijkheid om nieuwe woorden te maken aan de hand van stammen, voor- en achtervoegsels waarover de taal beschikt, maken het mogelijk gelijkaardige woorden te maken, of zelfs woorden die identiek zijn aan bestaande woorden. Een klassiek voorbeeld is de zinspeling op een *sentema verkisto*, een gevoelig auteur (sento= gevoel, ema=neiging), maar men kan dit woord ook interpreteren als een "auteur zonder thema" (sen-tema = zonder thema). Een ander grappig voorbeeld: *diamanto* is een diamant, maar men kan het ook verstaan als "die van God houdt" (di-amanto). Of de constatering dat Esperanto de internationale communicatie vergemakkelijkt, en dus af en toe tot internationale huwelijken heeft geleid:

edzperanto (edzo=echtgenoot, peranto= tussenpersoon).

Ook veel voorkomend - hoewel misschien niet echt aan te raden omwille van de internationale verstaanbaarheid is het vermengen van woorden of uitdrukkingen in het Esperanto en een nationale taal. Eigenlijk heeft iedereen die een vreemde taal leert, wel eens zo een woordspeling ontmoet - of zelf gemaakt - maar ik heb de indruk dat dit in het Esperanto om één of andere reden veel vaker voorkomt. Een voorbeeld van zo een uitdrukking, die ook Duitsers en Engelstaligen zullen begrijpen, is: *Mi faras mian beston.* Er wordt hiermee bedoeld 'ik doe mijn best', ware het niet dat 'besto' in het Esperanto 'dier' ofte 'beest' betekent. Resultaat: "Ik doe mijn beest". Niet echt geruststellend dus...

Wanneer we het over humor in het Esperanto hebben, is het onvermijdelijk om twee klassieke auteurs te vernoemen, beide waren Fransman en zijn reeds overleden: Louis Beaucaire en Raymond Schwartz. Louis Beaucaire is één van de vrolijkste auteurs in de Esperanto-literatuur, voornamelijk door twee werken: *Kruko kaj Baniko en Bervalo* en *El la vivo de bervala sentaŭgulo*. De titels houden geen woordspelingen in, maar het heeft wel een soort voorbeeld gesteld voor verder gebruik onder de Esperantosprekers: Kruko en Baniko zijn de eigennamen van de protagonisten (zoiets als Jantje en Pietje) en Bervalo is een denkbeeldige plaats. Het eerste werk is een eenvoudige verzameling van moppen, velerlei internationaal bekende en een beetje schuine moppen, over het algemeen toch goed verteld. (Dit boek is trouwens via het internet te lezen in html- en pdf-formaat).

Het tweede boek (*Uit het leven van een Bervaals deugniet*) is een verzameling kortverhalen, waarin Esperanto vermengd is in de amoureuze avonturen van de protagonist, wat soms tot hilarische toestanden leidt. Dit boek werd ook naar het Baskisch vertaald.

Raymond Schwartz was de beste 'ontginner' van de mogelijkheden van humor in het Esperanto. Francés, afkomstig uit de Elzas, een bankdirecteur overdag en de rest van de tijd een bon-vivant, schreef niet alleen talrijke artikels en meerdere boeken, hij was ook de ziel van het Esperanto-cabaret, dat gedurende meerdere jaren in Parijs actief was. De voornaamste namen waren: *La Verda kato* (De groene kat), *La bolanta kaldrono* (De kokende ketel), *La tri koboldoj* (De drie kabouters). Zijn boeken worden nog tot op de dag van vandaag aangeraden aan diegenen die zich willen vermaken en ook om zich te verdiepen in de taal.



Men kan beginnen met *La stranga butiko* (De rare winkel), een boek in verzen vol van woordspelingen en met een intelligente humor, te lezen via internet. De artikels waarin jaarlijks de actualiteiten geanalyseerd werden in een onrechtzinnige en humoristische vorm voor de progressieve vereniging SAT zijn gebundeld in *Kun siaspeca spico* (alweer een woordspeling: vertaalbaar als *een koekje van eigen deeg*).

Schwartz schreef ook de vooraanstaande roman *Kiel akvo de l' rivero* (Als water van de rivier), waarin de humor aanwezig blijft, doch dit is niet het essentieel element van het werk. Er werd een website speciaal aan zijn leven en werk gewijd: http://www.go.to/kabareto.

Terwijl Beaucaire een zeer internationale humor gebruikte, gebaseerd op situaties en paradoxen, is Schwartz veel moeilijker te vertalen, aangezien we met de meester van woordspelingen te maken hebben, tot op een ongekend niveau. Beiden gebruikten de techniek van de letterwisseling (contrepèterie in het Frans, spoonerismen in het Nederlands), gebaseerd op het verwisselen van bepaalde letters in dezelfde zin, zodat vaak choquerende uitdrukkingen ontstaan: van "mielkuko" (honingkoek) maakt hij "kiel muko" (zoals snot), van "plejpova nutro" (krachtig voedsel) maakt hij "plejnova putro" (nieuwste verrotting). In het oeuvre van Beaucaire kan men vele mogelijkheden vinden om uit de meest onschuldige zinnetjes heel gepeperde uitdrukkingen te maken.

Andere vermeldenswaardige namen zijn Izrael Lejzerowicz - overleden in Treblinka - die *El la Verda Biblio* (Uit de groene Bijbel) schreef, een parodie over de geschiedenis van de Esperanto-beweging, en Cezaro Rossetti, met *Kredu min, sinjorino* (Geloof me, mevrouw), een reeks anekdotes uit zijn leven als verkoper/vertegenwoordiger, een titel die op zijn beurt geparodieerd werd in een Esperantowoordenboek van schuine uitdrukkingen, *Knedu min, sinjorino* (Kneed mij, mevrouw), van Renato Corsetti, nu voorzitter van de Wereld-Esperantobond.

Onder de hedendaagse auteurs die humor aanwenden in hun literair werk kunnen we de leden van de zogenaamde Iberische groep vermelden, die niet aarzelen om hun werk met humor te spijzen. Dit is vooral het geval met Jorge Camacho, een schrijver die meesterlijk gebruikt maakt van de parodie en het pamflet. Voor diegenen die Esperanto nauwelijks

Een uittreksel uit: La Verda Biblio, de eerste regels:

1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon.
2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi.
3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto.



kennen is zijn werk moeilijk verteerbaar, maar als voorbeeld kunnen we de satire *La majstro kaj Martinelli*, vernoemen, waarin hij de spot drijft met de vertegenwoordigers van een vooral opportunistische tendens van de actuele Esperantobeweging, en die gebaseerd is op het werk van de Rus Mijail Bulgakov *El maestro y Margarita*, waarvan de Esperanto-vertaling een aanzienlijk succes had.

Tenslotte bestaan er in het Esperanto ook talrijke vertalingen, waaronder uiteraard ook humoristische, denken we bijvoorbeeld aan de zopas overleden Ephraim Kishon waarvan in het Esperanto *Elektitaj satiroj* verscheen.

Ook heel bekend zijn de avonturen van Asterix, die niets van hun waarde verliezen in het Esperanto. Voor de kinderen zijn er ook de avonturen van Winnie-the-Pooh en Pipi Langkous. Opnieuw voor volwassenen zijn er de avonturen van de dappere soldaat Svejk, van Jaroslav Hašek, dat ook via het internet te lezen valt.

Van eigen bodem moeten we zeker de architect F.V. Dorno vermelden (zijn echte naam: Frans van Dooren 1905-1996). Hij schreef satires, toneelstukken, hoorspelen en poëzie zowel in het Nederlands, Afrikaans, Engels als Esperanto. In het Esperanto verscheen de komedie *Levu la manojn* (dat ook in het Nederlands opgevoerd werd) en *Kia miksaĵo*. De tweede is een typische deurenklucht over een familie - waarvan niet iedereen Esperanto kent - die een Esperantospreker te gast heeft en waardoor dan ook de nodige misverstanden ontstaan.

Dit blijspel is tweetalig: Nederlands en Esperanto. (In het boek zijn tevens de Franse, Duitse en Engelse versies gebundeld.) Verder verschenen van hem ook satires in *La Aventuroj de Lia Reĝa Moŝto Stultulof* (1937) en *Satiroj* (1977). Ook interessant om weten is dat hij de motor was van het schrijverstrio dat onder het pseudoniem *Deck Dorval* een viertal misdaadromans in het Esperanto publiceerde.

Ziezo, is er nog iemand die denkt dat Esperanto "koud en zonder animo" zou zijn?

Vertaling en bewerking: Lode.

Volgende werken zijn te verkrijgen bij de Vlaamse Esperantobond:

L. Beaucaire: *El la vivo de bervala sentaŭgulo* (7,44 euro)
R. Schwartz: *Kiel akvo de l' rivero* (18,20 euro)
R. Schwartz: *Kun siaspeca spico!* (9 euro)
R. Schwartz: *Stranga butiko* (7,89 euro)
A. Torras: *D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson* (6,20 euro)
A. Torras: *Malpli da teksto kaj pli da sekso* (11,10 euro)
A. Torras: *Pli ol homo esperantisto* (6,71 euro)
A. Torras: *Romantikulo de la XXa jarcento* (9,90 euro)
A. Torras: *Vivo simplas* (12,30 euro)
C. Rossetti: *Kredu min sinjorino* (13,20 euro)
R. Corsetti: *Knedu min sinjorino* (3,30 euro)
J. Camacho: *Liturgio de l' foiro* (3,37 euro)
J. Camacho: *Celakantoj* (poëzie) (10,00 euro)
J. Camacho: *Saturno* (poëzie) (10,80 euro)
E. Kishon: *Elektitaj satiroj* (7,34 euro)
A. Milne: *Winnie-la-pu* (12,30 euro)
A. Lindgren: *Pipi ŝtrumpolonga* (10,00 euro)
F. Dorno: *Aventuroj de L.R.M. Stultulof la Xa* (2,00 euro)

Etimologio de etimo

Dum la preparo de la vortaro mi renkontis en PIV la vorton **galuso**, kiu signifus *tre malpeza konkursbiciklа kunkudrita pneŭo, enhavanta aertubon*. La difino ŝajnas al mi iom enigma, kaj mi do nepre deziris koni la etimon de la esperanta vorto (la fremdlingvan vorton, kiu estis la bazo de la esperanta vorto). Mi ne kuraĝis tuj konkludi ke galuso estas tio, kion ni en nederlanda nomas **tube** (pneŭo de konkursbiciklo). Precipe la 'kunkudrita' kaj la 'enhavanta' igis min heziti.

Mi sendis retpoŝtan demandon al deko da 'biciklistoj' el la Jarlibro, kaj iu Usonano sciigis al mi ke la esperanta vorto unue aperis en verko de Karolo Piĉ, verŝajne en *La Litomiŝla Tombejo*. Kaj efektive mi tie trovis la vorton, kun en klariga listo la difinon, sed sen plia indiko pri deveno. Mia korespondanto ankaŭ sciigis al mi ke PIV verŝajne prenis ĝin el la listo de Vatré (ne-PIV-aj vortoj). La difino en PIV klare rekte venas el la libro de Piĉ. La etimo de la esperanta vorto 'galuso' do estas la ĉeĥa (kaj slovaka) 'galuska'.

Tiel miaj helpopetoj direktiĝis al Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Kaj... eĉ atingis la Ĉeĥan Akademion de Sciencoj, de kiu mi, malrekte, ricevis vastan klarigon. Hazarde ili ĵus esploris la aferon, kaj preparis artikolon por sia gazeto 'Nia Lingvo'. La vorto nepre devis havi fremdan originon, ĉar ĉeĥaj vortoj normale ne komenciĝas per la litero g.

Ankaŭ la akademio komence ne sciis, kiel estiĝis la vorto 'galuska'. Oni pensis pri germanaj produktantoj de sintetika kaŭĉuko el 1910, sed la spuro estis falsa. En fontoj pri historio de biciklado kaj pri pneŭoj oni trovis indikojn, ke la vorto devenas de la franca 'Gaulois(e)'. La Gauloise estas marko de la unuaj bicikloj en Francio, en la 19a jarcento. La bicikloj estis produktitaj en 'La Manufacture Stéphanoise de Cycles «La Gauloise»'. Tiu fabriko estis fondita de Paul de Vivie (1853-1930), kiu ankaŭ, sub la pseŭdonomo Vélocio, eldonadis la gazeton 'Le Cycliste', por propagandi la bicikladon.

La vulkanizado de kaŭĉuko estis inventita en 1839. La fratoj Eduard kaj André Michelin fondis fabrikon por produktado de pneŭmatikoj, komence por bicikloj, ekde 1895 ankaŭ por aŭtomobiloj. La firmao fariĝis la plej granda produktanto de pneŭoj, kaj sur ĝiaj afiŝoj aperis surskribo 'Le Gaulois Motocyclette'. La filo de Eduard, Pierre Michelin, fondis en 1934 en Prago fabrikon 'Pneumichelin'. Kompreneble aperis multaj flugfolioj, afiŝoj kaj aliaj reklamoj kun motivoj de 'Gaulois'. La popolo komencis nomi unu el la pneŭoj 'galuska' kaj en 1937 la vorto por la unua fojo aperis en klariga vortaro de la ĉeĥa lingvo. La ĉeĥa (kaj ankaŭ slovaka) etimo estas do la franca vorto 'gaulois'.

En la klariga vortaro de slovaka lingvo, kiun mi havas, aperas pli klara difino ol tiu de Piĉ. Tie nome aperas ke la plej grava kvalito de galuso estas, ke la aertubo kaj la ekstere mantelaĵo estas kungluitaj, tiel ke la aertubo ne estas elmetebla kiel ĉe normalaj pneŭoj.

Por akiri tiujn informojn mi bezonis kelkajn semajnojn. Kaj tiam mi kun pura konscienco povis meti en la vortaron: galuso - tube. Kaj tiel ankaŭ multaj aliaj simplaj vortoparoj en la vortaro havas sian historion. La finaĵo 'ka' de la ĉeĥa vorto ne estas miriga, ĉar ĝi havas, en la ĉeĥa, similan signifon kiel aĵo aŭ umo en Esperanto. 'Galuska' do signifas ion kiel 'gaŭlaĵo, gaŭlumo' en Esperanto.

La informojn de la Ĉeĥa Akademio mi ricevis danke al Miroslav Malovec, kiu do, vole-nevole, estas kunaŭtoro de tiu ĉi artikoleto.

pds

RECEPTOJ.

Post la aperigo de la artikoleto pri la Dendermonda vlajo alvenis 1783 petoj de legantoj por ricevi la recepton. La sanktan sekreton ni ja ne povas diskonigi, sed ni povas ja liveri, anstataŭe recepton de malpli luksa similaĵo.

1. Alsta Vlajo*.



Bezonitaĵoj:
1 litro da lakto, 45 pecoj da sukero, 2 ovoj, 400 g da kanda siropo bruna, 1 kafkulereto da cinamo, iomete da maciso kaj 7 besteloj**.

Preparo:
Boligu la lakton kaj aldonu la sukeron. Raspu la bestelojn kaj aldonu tion al la lakto. Batu la ovojn, tiel la blankaĵojn kiel la flavaĵojn, kun aldono de la maciso kaj la cinamo, kaj ĵetu ĝin en la miksaĵon. Nun enkirlu la siropon kaj bone miksu ĉion. Metu la kaĉon en fajrorezistan ujon, prefere en specialan vlajujon el grejso.

Sugesto:
La vlajo estas preta se sur trikilo, post enŝoviĝo, ne gluiĝas iom de la kaĉo.

(Tiu ĉi recepto akiris la unuan premion en Alsta vlajokonkurso. La recepto estas de s-ino M. Everaert.)

* Mi ne sugestas enkonduki tiun vorton kiel neologismon. Nederlande: vlaai.
** Bestelo = malgranda, plata, ringforma paneto el miksita faruno (duone tritiko, duone sekalo) kun anizo, tre malmola... Nederlande: mastel, bestel. Se vi ne povas trovi ilin, kaj tio estas tre probable, vi povas anstataŭi ilin per biskotoj (beschuit, nederlande). Ankaŭ tiu ĉi vorto ne estu enkondukita. En Gento, ĉe la Koornmarkt, estas antikva malgranda panvendejo, kie vi ĉiam povos trovi bestelojn.

---

2. Cepa Supo.


Bezonitaĵoj:
Duona kilogramo da cepoj, sama kvanto da terpomoj, unu poreo, unu celerio, 3 supkuleroj da graso porka, 3 litroj da akvo, 1 laŭrofolio, pipro kaj salo, pankrustetoj aŭ 100 gramoj da muelita fromaĝo.

Preparo:
Tranĉaĵigu la cepojn. Konservu unu belan cepon. Stufu la cepojn en la graso. Aldonu bolintan akvon, poreon, celerion, tranĉitajn terpomojn kaj laŭron. Pipru kaj salu. Metu sur moderan fajron kaj lasu plenkuireti. Intertempe stufu la restantan delikattranĉitan cepon kaj aldonu ĝin al la supo.

Finfine vi kronu vian majstraĵon per la bakitaj pankrustetoj aŭ superŝutu la fajne raspitan fromaĝon.

(Recepto laŭ: Ludoviko Paŭlo Boon, en 'Manĝi Flandre')

pds



Raporto pri vizito al la "Centre Polyglotte" en Bruselo

Merkredon, la 24-an de novembro 2004, la esperantistoj Marcel DELFORGE kaj Remy SPROELANTS vizitis la poliglotan klubon de Bruselo, 20, rue Général Fivé (Etterbeek).

La klubdomo situas en la "Jardin de Fontenay" kaj disponas pri granda lokalo, kie la klubanoj povas diskuti en pluraj lingvoj pri arbitraj temoj. La klubo kunvenas ciumerkrede je la 20.00 horo gis... kaj ofertas la eblecon trinki kaj mangi ion je tre demokrataj prezoj.

Ni estis akceptitaj de la Ĝenerala Sekretario de la CPB, S-ro Roger MALEVEZ kaj konstatis ke en tiu loko pluraj lingvoj (franca, nederlanda, angla, germana, hispana, itala, rusa kaj kelkfoje la Portugala, la Pola kaj eĉ ĉi tiun merkredon la Ĉeĥa) estis parolataj je diversaj disarangitaj tabloj. La pli granda tablo estis la franca, poste la angla kaj la germana kaj poste la nederlanda.

Regis tre agrabla etoso kaj la homoj vigle diskutis pri la plej diversaj temoj. Ni unue iris al la angla, poste al la nederlanda tablo kaj konstatis kun ĝojo ke la homoj multe interesiĝis pri internacia lingvo. Kompreneble, multaj tute neniam aŭdis paroli pri Esperanto, sed, tamen, aŭskultis tre interesite al niaj eksplikoj kaj - jes, kompreneble - al nia reklamo kaj varbado favore al nía lingvo internacia. Remy eĉ notis la retadresojn de kelkaj interesuloj kaj poste sendis al ili informojn (ttt-ejoj UEA, FEL, APE, kaj eblecojn por lerni Esperanton rete ekz. ĉe www.lernu.net kaj aliaj).

La konkludo de ĉio estas ke ni esperantistoj devus pli ofte kontakti la eksteran mondon por divastigi esperanton. Ni ne povas resti enfermitaj en niaj verdstelaj, eburaj turoj. Fine, laŭ la peto de Marcel, S-ro MALEVEZ tute ne kontraŭas la proponon ke ni, esperantistoj ankaŭ havus tablon kun la sildo 'ESPERANTO' en la klubo, kondiĉe ke estus almenaŭ kelkaj (= 3 - 4 aŭ pli) parolantoj en nia lingvo.

Laŭ la raportantoj tiu kunveno estas elstara ebleco por montri nian Verdan Stelon kaj por enmiksiĝi en la aliaj grupoj kaj paroli en kiel eble multaj lingvoj PRI la internacia lingvo. Laŭ ni, tiu loko estas la perfekta ejo por varbado kaj disvastigado de niaj ideoj kaj la lingvo internacia. Pro tio, ni petas la legantojn de ĉi tiu raporto kaj tre speciale la respondulojn de la Esperantaj Kluboj disvastigi ĝin ekzemple en la klubaj revuoj kaj paroli pri la afero kun viaj klubanoj.

Sed ankoraŭ pli grave: instigi la esperantistojn partopreni al la diskutoj en la Belgaj Poliglotaj Centroj (vidu detalan liston ĉe http://www.cerclepolyglotte.com/) Troviĝas kluboj en Antwerpen, Ath, Brussel, Charleroi, Hulpe (La), Luik, Verviers kaj Waterloo. Leganto kiu deziras partopreni al tiu projekto aŭ kiu deziras ricevi pli da informoj povas kontakti unu (aŭ ambaŭ) raportantoj.

Se Remy trovas sufiĉan fonduson kaj apogon, li eĉ pensas establi Poliglotan Klubon en la Provinco Limburgo (Hasselt, St-Truiden, Beringen.), ĉar en Flandrio nuntempe nur ekzistas la antverpena klubo. Ĉiu esperantista polígloto kiu volas kunlabori pri tiu projekto estas petita kontakti Remy.

Koran dankon pro la legado kaj antau ĉio pro la kunlaboro.

Marcel DELFORGE - mardelforge@brutele.be
Remy SPROELANTS - respro@biz.tiscali.be

Referencoj: http://www.cerclepolyglotte.com/ : TTT-ejo de la Universala Poliglota Centro http://users.swing.be/polyglot.be/ : TTT-ejo de la Brusela Poliglota Centro http://users.belgacom.net/linguists.club/ : TTT-ejo de la Antverpena Poliglota Centro

2005-2 Deze aflevering verschijnt in maart, het thema is dus de lente. Lees over de laatste sneeuwvlok in het gedichtje van Alexander Logvin. Het gedicht brengt ook de gelegenheid even uit te weiden over problemen in het woordgebruik.

PRINTEMPO

(N.B. Ĉiuj difinoj kaj multaj klarigoj en la teksto fontas el PIV2)

1) PRINTEMPO

Poemeto pri la alveno de printempo.
(Malfacilaj vortoj: neĝero *sneeuwvlok*; reto *net(werk)*; ektremi *trillen*; torento *bergstroom, vloed*; radii, *stralen*; ĝojsento *gevoel van vreugde*; manplato, *handpalm*).

Lasta neĝero *A. P. Logvin*

Sub reto de neĝo
ektremas torento,
ĉu fiŝo arĝenta ekbrilas?
Radias la suno
alvenas ĝojsento ----
aprilo
aprilo
jubilas!
Printempo karesas
ĉe ŝtonparapeto
neĝeron
kun varma kompato,
sed ve!
malaperas
ĉi lasta floreto
de vintro
sur ĉarma manplato ...

(Esperanta antologio, UEA 1984, p. 640).
Logvin, Aleksandro Porfirjeviĉ (1903-1980). Sovetiano kaj rusiano (kun danko al gelingvistoj Pentus el Moskvo pro jenaj precizigoj: li naskiĝis en Ukrainio sed loĝis en Moskvo de 1925 ĝis la morto, escepte de ekzilo en 1930-1931), esperantisto de 1923. Verko: *Sur la vivovojo* (poemaro, 1964).

Kelkaj demandoj pri la poemo

| La neĝo ĝenerale formas **tavolon**[1], sed ĉi tie temas pri reto. Kial?
| Torento ĝenerale fluas rapide, sovaĝe, kaj ĉi tie ĝi **ektremas**. Kial?
| Kial la verkisto metas demandon pri la fiŝo?
| Ĉu la verkisto staras sur la bordo de la torento?
| Ĉu li estas sola?
| La spaca prezentado de la teksto estas **nekutima**: kiel tio efikas?

N.B. Por lernemuloj: Leginte la subajn ekzercojn, provu rediri ilin kovrante alterne la partojn markitajn per vertikala linio kaj la nemarkitajn.

Komentoj pri la vortprovizo
Neĝero : la sufikso -ER-

a) <u>**Neĝo, neĝero**</u>
Kion esprimas la sufikso -er-?
| unu el la elementoj, el kiuj konsistas tutaĵo.

Anstataŭ 'neĝero' oni povas diri ankaŭ:
| neĝofloko, floko de neĝo[2].

Anstataŭ '**guto**' oni povas diri ankaŭ:
| akvero.

b) <u>Fajrero</u>[3]
Krom 'fajrero' ekzistas ankaŭ 'sparko'. Diferenco?
| **Sparko** estas pli precize fajrero, kiu estiĝas inter elektrodoj. Sparko *elektrische vonk*.
| Kp. sparkilo *bougie*.

c) <u>**Ĉeno kaj ĉenero**</u>
La forto de ĉeno[4] dependas de la forto...
| de la plej malforta ĉenero[5].
Klarigu la esprimon: 'Kie maldike, tie rompiĝas'.
| **Rompiĝo** okazas en la plej malforta loko de io.
Komparu 'ĉeno / kateno[6]'
| 'ĉeno' pli sugestas ideon de ligilo, 'kateno' pli sugestas tiun de fortikeco, **malhelpo**, ĝeno, puno[7].

ĉ) <u>Greno kaj grenero.</u> Komparu

graan	greno		
(graan)korrel	grenero		grajno
grein (klein gewicht)		grano	
greintje		grano	grajno

Testu vin! Kompletigu kaŝinte la duan kolumnon.

Rakonto sen ia ... da vero.	grajno
...etoj de sablo.	grajnetoj/sableroj
Ĵeti ...ojn al la birdoj.	grajnojn
Mueli[8]...on por fari **farunon**[9].	grenon
Eĉ blinda kokino povas trovi ...on[z].	grajnon
Li ne havas en la kapo eĉ unu ...on da saĝo[Z].	grajnon /granon
Kiam estas **semota**[10] vintra ...o?	greno
Malgranda kiel...o de rizo.	grajno
Kia ..., tia pano[z].	greno
Grenero estas ... de greno.	grajno
...o de hajlo[11]	grajno
...o da pura oro en amaso **kota**[z].	grano
En silo oni konservas	grenon
N.B. grenejo estas...	domo aŭ parto de domo

Reto
Kio estas reto?
| teksaĵo[12] el ŝnuroj[13], fadenoj[14] kaj similaj, **interplektitaj** kun grandaj aŭ malgrandaj interspacoj (la maŝoj[15]).

Testu vin! *a) Reesperantigu la subajn vortojn kaj uzu ilin en kunteksto. b) Komentu la terminojn grase presitajn.*

1 laag 2 sneeuwvlok 3 vonk 4 ketting 5 schakel 6 keten, boei 7 straf 8 malen 9 bloem 10 zal gezaaid worden 11 hagel 12 weefsel, textiel 13 touw, koord 14 draad 15 mazen

En/Ĉe kiuj popularaj sportoj oni uzas retojn?

ĉe teniso, **piedpilko** (futbalo), korbopilko (basketbalo)...

Por kio povas servi reto? (bestoj, homoj, aĵoj)

Por kapti bestojn, ekz. fiŝojn, papiliojn[16], birdojn...
Figurasence, por **influi** homojn. Kp.:
'Virina **rideto** pli kaptas ol ... reto[z]'.
Por porti aĵojn oni uzas i.a. sakon el reto.

Ekzistas ankaŭ tutmonda komputila reto, la ...

interreto[17].

Uzi la interreton nomiĝas ...

(inter)retumi[18]

Por ricevi retpoŝt(aĵ)on[19], vi devas havi ... .

ret(poŝt)adreson[20].

Ĉu vi ŝatas **retpoŝti**[21]?

Ektremi

Vortproviza komparo inter du lingvoj:

PRISMA	VERSCHUEREN	DE SMEDT
sidderen hevig beven	hevig beven	tremi
trillen beven, rillen	hevig beven	trem(et)i+ (trili, vibri,oscili)
rillen beven, trillen	huiveren, sidderen, beven	tremi
bibberen rillen	rillen	trem(et)i
huiveren rillen, terugschrikken	beven, rillen	tremi, time retiriĝi, heziti
flakkeren		flagr(et)i, tremeti

Torento

Kio alia povas **elflui** abunde kaj rapide?

(stort)vloed van	torento da
tranen	**larmoj** (torentaj larmoj)
woorden	da vortoj
scheldwoorden	da insultoj
van gedachten	da pensoj
stortregen	torenta pluvo, pluvtorento

Ĝojo

Duoblaj ekzercetoj: *A) Parigu la vortojn de la unua kolumno kun ilia traduko kaj inverse (kp. la solvojn sub ĉiu ekzerceto).*
B) Traduku ĉiun kolumnon kaŝante la alian.

vreugde bereiden

a ĝoji	1 *verheugend*
b ĝoja	2 *iem. vreugde bereiden*
c ĝojiga	3 *blij zijn*
ĉ ĝojigi	4 *blij*
d kaŭzi ĝojon al iu	5 *verheugen*
e fari ĝojon al iu	

Solvoj: ac, bd, ca, ĉe, db, eb (1c, 2de, 3a, 4b, 5ĉ)

vreugde beleven

a ĝoji pri, pro io	1 *dat stemt tot vreugde*
b partopreni en ies ĝojo pri, pro	2 *blij zijn om, over iets*
c (du)opa ĝojo estas (du)obla ĝojo	3 *vreugde scheppen in, vr. eraan beleven*
	4 *in iemands vreugde*

ĉ sperti, travivi ĝojo	*delen*
d tio **alklinigas** al ĝojo	5 *gedeelde vreugde is dubbele vreugde*
	6 *vreugde om*

Solvoj: a2, b4, c5, ĉ3, d1 (1d, 2a, 3ĉ, 4b, 5c).

vreugde (be)tonen,

a **elmontri**; esprimi sian ĝojon.	1 *zich in de handen wrijven*
b **froti** al si la manojn pro ĝojo	2 *opspringen van vreugde*
c (alte) eksalti de/pro ĝojo	3 *zijn vreugde (be)tonen, betuigen*

Solvoj: a3, b1, c2 (1b, 2c, 3a)

stralende vreugde

a **delira** pro ĝojo	1 stralend van vreugde
b ĝojebria	2 uitzinnig van vreugde
c la ĝojo **atingis** la supron	3 vreugdedronken, dronken van vreugde
ĉ ĝojradia, **radii** de/pro ĝojo	4 de vreugde steeg ten top

Solvoj: a2, b3, c4, ĉ1

vreugdeverstoorder

a ĝojĝenantoDS	1 een domper op de vreugde
b glacia duŝoDS	2 was van korte duur
c la ĝojo forflugis rapide	3 vreugdeverstoorder

Solvoj: a3, b1, c2

Ne konfuzu: **malĝoja / senĝoja**!

malĝoja: sento de iu malĝojanta
senĝoja: sentanta nenian ĝojon
malĝoji *bedroefd zijn*, senti vivan malagrablan senton pro ia malfeliĉo.
malĝojo *droefheid*

Du proverboj

Vera amiko estas amiko en ĝojo ...

kaj malĝojo[z].

aŭ Vera amiko estas amiko en ĝojo kaj ...

ploro[z].

Testu vin! Ekzercoj kaj b

16 vlinders 17 internet 18 surfen 19 e-mail
20 e-mailadres 21 e-mailen

Ree pri la temo 'printempo'

Kiam komenciĝas (la) printempo?

la 21an de marto

Ĉu 'printempo' aŭ 'la printempo'?

Multe dependas de la nacia lingvo de la parolanto. Laŭ PAG (paĝon 98, §7a), kiam la nomo de la sezono estas subjekto de verbo de agado (komenci, veni, aperi, fini, surprizi...), oni inklinas uzi ĝin kun artikolo. La kialo laŭ mi estas, ke la sezono iĝas kvazaŭ aganto kaj akiras ian personecon. Aliokaze, oni uzas ĝin same kiel ekz. la nomojn de tagoj. Ĉiu

akceptos kaj evitos laŭ sia propra lingva kutimo iun el jenaj konstruoj:
Tiun jaron la vintro estis ege frua.
Tiun jaron estis vintro ege frua.
Tiun jaron vintro estis ege frua .

Kion oni volas diri per tio, ke la naturo estas en **letargio**?
ke ĝi ŝajnas profunde dormi.

Kio estas vintrodormo?
Vintrodormo en PIV: speco de letargia stato, en kiun venas dum vintro iuj **mamuloj**[22] (ekz. gliro[23], marmoto, vesperto[24] k.s.)

Ili ... en letargion, en vintrodormon.
falas

Post la vintra frosto la akvo **degelas**[25]. Kie oni observas tion?
sur la riveretoj, la lag(et)oj, la stratflakoj[26], la fosaĵoj[27], la kanaloj[28].

Kio estas la printempa **riveraltiĝo**?
Pro la degelo, pli da akvo fluas al la riveroj.

Kio estas la degelbaroj[29]?
La vojoj estas baritaj pro la **degelo**, ĉar la grundo kaj la vojkovraĵoj[30] iĝas molaj.

Kion oni komprenas sub la degelo de politikaj rilatoj?
ke la rilatoj **malstreĉiĝas**.

Kaj sub la degeliĝo de bankkonto aŭ de kreditoj?
ke la bankkonto ne plu estas blokita kaj la kreditoj ne plu **frostigitaj**[31].

Al glacio printempa kaj al amiko tro nova ne fidu[z].
Kial printempa glacio ne estas **fidinda**?
pro la altiĝo de la temperaturo, la glacio **rompiĝas** facile.

Kion oni observas sur la fruktarboj en tiu sezono?
Ili burĝonas [32]. La foliburĝonoj kaj la florburĝonoj **ŝvelas** kaj krevas[33].

Ne konfuzu -ita / -inta!
praktika proksimuma signifo:
-inta = kiu/kio "faris" mem (eĉ se temas pri 'frosti') → verbo netransitiva
-ita = kiu/kio estas/estis "farita" de alia → verbo transitiva

la longe frost--aj lagetoj	frostintaj
frostig--aj kreditoj	frostigitaj
la finfine degel--a glacio	degelinta
la rompiĝ--a glacio	rompiĝinta
glacio romp--a pro granda premo	rompita
la degelig--aj internaciaj rilatoj	degeligitaj
la ŝvel--aj florburĝonoj	ŝvelintaj
la krev--aj burĝonoj	krevintaj
la krev--a pneŭ(matik)o	krevinta
la trapik--a pneŭ(matik)o	trapikita
krevig--a pneŭ(matik)o	krevigita

Unu kukolo[34] printempon ne venigas[z].=?
Kiam kukolo post la vintro kukuas, iuj pensas, ke tio **anoncas** la alvenon de la printempo. Tamen: unu signo povas anonci, sed ne sufiĉas por efektivigi.

Rilate la homan vivon, la printempo estas ...
la simbolo de la juneco.

Kompletigu kaj klarigu:
Printempo semas, aŭtuno ...
rikoltas. Kion oni lernas juna, tio poste utilos.

Testu vin! Ekzercoj a kaj b
22 zoogdieren 23 zevenslaper 24 vleermuis
25 dooien 26 plas 27 gracht 28 gracht
29 dooiversperring 30 wegdek 31 bevroren
32 uitbotten 33 barsten 34 koekoek

2) VORTFARADO. LA SUFIKSO -ET- (sekvo)

La difino de PIV gravas por kompreni la signifon de pluraj diminutivoj: "sufikso esprimanta la malplej altan gradon de grandeco aŭ intenseco, plej ofte kun specialigo de la radikvorta ideo" (substreko de mi).

Ekzerco: Parigu ĉiun vorton el A kun ĝia traduko en B kaj komparu kun la solvoj en C!

A) ameto - beleta - dormeti - ebrieta - faleti - flugeti - frenezeta - glaseto - juketi - kanteti - krieti - malsaneta - malseketa - malvarmeta - koel - nebuleto - paŝeti - pluveti - rideto - rivereto - salteti - sonoreti - ŝnureto - ŝtrumpetoj - tuseti - varmeta - venteto - vojeto

B) aangeschoten - beek - briesje - fladderen - genegenheid - glimlach - huppelen - janken - knap - kuchen - lauw - likeurglaasje - motregenen - neuriën - niet goed wijs - ongesteld - pad - sluimeren - sokken - struikelen - tingelen - tintelen - touwtje - trippelen - vochtig - waas -

C) *Solvoj: ameto genegenheid - beleta knap - dormeti sluimeren - ebrieta aangeschoten - faleti - struikelen - flugeti fladderen - frenezeta niet goed wijs - glaseto likeurglaasje - juketi tintelen - kanteti neuriën - krieti janken - malsaneta ongesteld - malseketa vochtig - malvarmeta koel - nebuleto waas - paŝeti trippelen - pluveti motregenen - rideto glimlach - rivereto beek - salteti huppelen - sonoreti tingelen - ŝnureto touwtje - ŝtrumpetoj sokken - tuseti kuchen - varmeta lauw - venteto briesje - vojeto pad*

3) VERTAALOEFENING

Een uitdaging: laten we eens een poging doen om de ballade van Heer Halewijn te vertalen ! Het rijm speelt hier een belangrijke rol, dus is het aanbevolen ook in de vertaling een rijmende tekst te maken. Natuurlijk gaat dat soms ten koste van de trouwe weergave van de brontekst. In de mate van het mogelijke is ook het aantal lettergrepen van het origineel in acht te nemen. Jammer genoeg gaat in de vertaling ook het archaïsch karakter van de taal verloren, maar dat is nu eenmaal zo. Alle suggesties zijn welkom!

Heer Halewijn

1 Heer Halewijn zong een liedekijn,
Al wie dat hoorde wou bij hem zijn.
3 En dat vernam een koningskind,
Die was zo schoon en zo bemind.
5 Zij ging al voor haar vader staan :
« Och vader, mag ik naar Halewijn gaan ? »
7 « Och neen gij dochter, neen gij niet !
Die derwaart gaan en keren niet. »
9 Zij ging al voor haar moeder staan :
« Och moeder, mag ik naar Halewijn gaan ? »
11 « Och neen gij dochter, neen gij niet !
Die derwaart gaan en keren niet. »
13 Zij ging al voor haar zuster staan :
« Och zuster, mag ik naar Halewijn gaan ? »
15 « Och neen gij zuster, neen gij niet !
Die derwaart gaan en keren niet. »
17 Zij ging al voor haar broeder staan :
« Och broeder, mag ik naar Halewijn gaan ? »
19 « 't Is mij al eens waar dat gij gaat,
als gij uw eer maar wel bewaart
21 En gij uw kroon naar rechten draagt. »
Toen is zij op haar kamer gegaan
23 En deed haar beste kleren aan.
Wat deed zij aan haren lijve ?
25 Een hemdeken fijnder als zijde.
Wat deed zij aan haar schoon korslijf ?
27 Van gouden banden stond het stijf.
Wat deed zij aan haren roden rok ?
29 Van steke tot steke een gouden knop.
Wat deed zij aan haren keerle (lang overkleed) ?
31 Van steke tot steke een peerle.
Wat deed zij aan haar schoon blond haar ?
33 Een krone van goud en die woog zwaar.
Zij ging al in haar vaders stal
35 En koos daar 't beste ros van al.
Zij zette zich schrijlings op het ros,
37 Al zingend en klingend reed ze door 't bos.
Toen zij dat bos ten halven kwam,
39 Halewijn zaan (spoedig) haar tegen kwam.
Hij bond zijn peerd aan eenen boom,
41 De jonkvrouw was vol angst en schroom.
« Gegroet », zei hij, « gij schone maagd,
43 Gegroet, zei hij, « bruin ogen klaar !
Kom, zit hier neer, ontbind uw haar ! »

4) UITWERKING VAN VORIGE VERTAAL-OEFENING

Uit 'Kijk' januari 2004, p. 54.

Computeren met gedachten.

Komputili per pensoj.

Scienca fikcio denove iĝis realo. La usona entrepreno Cyberkinetics Inc. komencos (ekkomencos, startos *noot 1*) en la daŭro de tiu ĉi jaro testojn pri la Braingate, blato (mikrocirkvito), kiu estas muntita en la kapon de paralizitaj pacientoj. Homoj, kiuj ne plu povas uzi siajn membrojn pro damaĝo en la spino (vertebraro, vertebra kolono, rakio), tamen ankoraŭ kapablas per la cerbo elsendi la signalojn. La blato kaptas ilin kaj transsendas ilin al ekstera aparato, ekzemple komputilo. Kaj tiel, principe, devus esti eble (devus ebli) funkciigi aparatojn per pensoj. Kun simioj la lertaĵon oni jam ofte sukces(plen)e (el)montris, kaj ĉial supozeblas, ke ĝi funkcios ankaŭ ĉe homoj.
Kaj nun, finfine, la afero okazos. Se la klinika testo tion permesas, oni enplantos Braingate blaton ĉe kvin grave (serioze) paralizitaj volontuloj . Kaj tio estas nur la komenco. La volontuloj estas la unuaj homoj kun tia blato en la kapo, do la esploristoj devas ankoraŭ precize lerni, kiujn signalojn ili devas kapti kaj kiel ili devas traduki ilin.
Kiam tiu unua fazo sukcese estos konkludita, oni disvolvos ĉe Cybernetics ankaŭ aliajn aparatojn, kiuj povos faciligi la vivon de la pacientoj. Oni povus ekzemple pensi pri motorizita rulseĝo, kiun oni povas funkciigi (priservi) per la penso.
